Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**




Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale




PLENUMITA 23/09/2021 Kvincentkvardeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

# DEKJARA! La Novaĵletero (AE)

## « La Aŭstraliaj Esperantistoj » naskiĝis 20/09/2011.




Dankon al miaj karaj kontribuantoj

Sen vi, AE ne povus ekzisti.



Skribu al la AE. Donu al ĝi vivon . .Informu la 300+ legantojn pri vi kaj viaj kluboj





Subtenu vian novaĵleteron antaŭ ol foriros la oportuno

*Roger Springer*

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au





Tri fotoj de mia piedo en blua ŝuo. Mi sidas en seĝo ĉe la malataŭo de mia domo. *Roger Springer*




**Ĉu vi sentas vin pli sekure ĉar Aŭstralio nun aĉetos subakvajn nukleajn ŝipojn?**

Imagu Sidnejon post kiam malamikoj aŭ akcidentoj detruus tiun nuklean ŝipon.
Ĉu iuj politikistoj kontraŭas tiun stultaĵon? Poste ĉiuj landoj dezirus aĉeti tiajn ŝipojn.
Pensu zorge pri la venonta voĉdono. La daŭra mondo eble dependos je tio. *Roger S*



Usono nun havas sociajn problemojn hejme. La solvo povus esti ekstera malamiko ĉe la alia flanko de la mondo.

**Memoru** Usono ne venkis militon post la 2a monda milito.
Anglujo ne venis por helpi Aŭstralion kontraŭ la venantaj Japanoj.
Mi loĝis en Ĉinujo dum pli ol unu jaro. Ĉinoj ne deziras militon.

**Zorge elektu viajn malamikojn. la proporcio de Aŭstralianoj al Ĉinoj estas 1 ĝis 57**

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

**Nur la Ĉefministro havas la rajton decidi fari militon aŭ ne.** Ne la parlamento

Do ne estis publika diskuto en la Usona Kongreso aŭ la britaj kaj aŭstraliaj parlamentoj pri la nova milita pakto. Ĉiuj tri registaroj pligrandigas siajn militplanojn sen eĉ la pretendo de demokrata respondeco?



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

**Esperanta Retradio**

Korpekzercoj kontraŭ Kovim-19 7a sept 2021



**Forĵetu viajn vortarojn.** Uzu Google Translate Kiel vortaron

## Entute 813,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas 280,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 227,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 200,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 106,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde februaro 2022)

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

# Universala baza enspezo (UBI)



Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro

Ekonomioj funkcias per la fluo de mono.

Universala Baza Enspezo ebligas ĉiujn havi monon por helpi la fluon de mono.

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Poentumado de ekzamenoj



Marcel plurloke menciis sian manieron poentumi ekzamenojn. Li ne deduktas poentojn pro eraroj sed aljuĝas poentojn pro ĝustaj vortoj/esprimoj, kaj ŝajne li kredas, ke tio estas pli bona sistemo ol la tradicia. Sed ĉu vere? Ni diru, ke estas demando kun la valoro 10 poentoj. Tradicie oni komencas de tio, ke la respondo valoras 10 poentojn -- minus la eraroj, se ili enestas. Jes, tio estas subjektiva, sed same la sistemo de Marcel. Bedaŭrinde subjektiveco estas ne evitebla, sed spertaj instruistoj strebas juĝi kiel eble plej juste. *Trevor Steele*



# Verega Historio


Do jen, sidu kiom eble plej komforte, dum mi rakontas veregan historion!

Iun belegan printempan matenon, fakte ne matenon, sed iom pli malfrue, do antaŭtagmezon, iu sinjoro malfermis la pordon de tipe dana fidrinkejaĉo, da kiuj estas multe, eĉ multege en Danujo,

Malferminte la pordon li eliris sur la ŝoseon kaj komencis laŭiri ĝin. Li iris dekstren kaj la tutan tempon li provis ne fali sur la ŝoseon. Danoj riskas tion, ĉar biero estas ilia nacia fidrinkaĉo, kaj tiu ĉi dano faris ĉion por montri sian naciecon!

Ĉar li estis terure ebria, eĉ fiebriaĉa, li baldaŭ perdis la ekvilibron kaj falis kapon malsupren en la ŝoseelfosaĵon, kiu situas laŭlonge de la ŝoseo. Tipe dana bildo, ĉu ne?

Do, kuŝante en la ŝoseelfosaĵo, li baldaŭ endormiĝis. Promenis sur la kampo granda porko. En Danujo porkoj ne estas permesataj sur la ŝoseoj, ili do restas sur la kampoj. Sed, ĉar la dana fiebriulaĉo ronkis terure laŭte, eĉ laŭtege, ĝi rapide iris ĝis la rando de la elfosaĵo kaj rigardis en ĝin. Ĉar ĝi ne estis blinda, la plej multaj danaj porkoj eĉ tre bonege vidas, same kiel ili ankaŭ tre bone aspektas, ĝi vidis la jam menciitan fidrinkemulaĉon kuŝantan senkonscia sur la fundo de la ŝoseelfondaĵo.





Nu, kion faras saĝa porko? Mi devas konfesi, ke mi tute ne scias, sed mi scias ke tiu ĉi, la heroo de tiu ĉi interesa historio, tuj saltis sur la fundon de la ĉeŝosea elfosaĵo kaj lekis la vizaĝon de la ronkanta fidrinkemulaĉo!

Iom nobla sinjorino preterpasis la amuzan scenon. Fakte, ŝi estis la edzino de la fidrinkemulaĉo, kiu ebrie kaj senkonscie kuŝis nemovante sur la fono de la ĉeŝosea elfosaĵo.

Ŝi kriis, fakte ŝi eĉ laŭtege kriegis al sia fidrinkemula edzo, ke nun ŝi hontas pro li. Kaj ŝi aldonis: "Vi malpurega fidrinkemulaĉo, tuj eliru el tiu ĉeŝosea elfosaĵo, forlasu la malpuregan porkon, kaj revenu hejmen!:

Tuj la porko ekstaris, eliris el la malpura ĉeŝosea elfosaĵo kaj foriris for de la hontaĵo, kaj hejmen al sia propra loĝejo! Salutojn de *Bob Felby*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Generalo Frank McKenzie



La estro de la Usona Centra Komando, agnoskis, ke usona drona atako en la ĉefurbo de Afganujo, Kabulo, malfrue en aŭgusto mortigis 10 civilulojn, inkluzive infanojn.

"Estis eraro, kaj mi ofertas mian sinceran pardonpeton," diris McKenzie. "Kiel batalanta komandanto, mi estas plene respondeca pri ĉi tiu frapo kaj ĉi tiu tragedia rezulto."



Se la aŭto de la generalo erare mortigus 10 homojn en Usono, ĉu pardonpeto ŝufiĉus? Ne egala mondo!



*Roger Springer*

# La Subjunkcioj

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**LA DIO DE CHRISTOPHER .**

(En ESK de Junio2021). Lia frato Jonathan Cooper tradukis pecon el lia libro *"The God Theorem: God seen through the eyes of a mathematician"*. Kial de matematikisto, dum la ideo pri dio estas sama de matematikisto aŭ lingvisto aŭ ĉarpentisto? La kredo en Dion ne dependas de ies profesio.

La verketo konsistas el naŭ aksiomoj, kaj la unuaj sep da ili estas tre interesaj kaj legindaj. Ili celas alkutimigi vin al la ideo, ke se ekzistas vorto, la afero devas esti "vera" kaj "logika". Sed la oka aksiomo ne disvolviĝas kiel la antaŭaj, ekzemple "Ĉu veran aŭ falsan, la homo bezonas vorton por indiki tion. Oni elektis la vorton "dio'' por tio kion oni volas kredi, ĉar oni bezonas ideon pri kio ne eblas tuŝi aŭ pri kio oni ne povas labori, kiel "matematiki". Ekzemple "Ĉu eblas, ke la ekstera mondo ekzistas?". Ne, la oka aksiomo estas, ke "dio" klarigas, kion oni ne povas klarigi. Sed intertempe la aŭtoro jam asertas, ke ĝi ekzistas: "Estas io preter la materia universo" (Aks.6).

Sed malbonŝance la aŭtoro nenie klare montras la diferencon inter "kredo" kaj "religio", kiu diferenco povas decidi pri nia morto. Kredi en dion estas sendanĝera. Multaj homoj faras tion, same kiel infanoj kredas la ekziston de la animaloj en la fabloj de *La Fontaine*, ĝis certa aĝo. Sed religio estas kombinaĵo de kredo kaj de la reguloj por ekzekuti la kredojn kaj la sociajn regulojn pri kunvivado kune. Se vi kredas en Dion, vi normale ne mortigos min se via Dio diras ke vi devas mortigi nekredistojn, sed kiam via religio diras tion vi mortigos min. Memoru kion faris la kristanoj en la Krucmilitoj kaj en Hispanujo, kaj kion nun faras aŭ farus la membroj de la islama religio.

Do laŭ mi kredo estas normala, eĉ iomete la kredo en dion, sed danĝeraj kaj detruindaj estas la religioj, eĉ se la religio estas nur persona vivregulo (kio okazis en Christchurch). Kaj se Christopher estus fidela kristano, li farus al la islamanoj kion ĉi lastaj faris al la kristanoj.

*Marcel Leereveld*.

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## KION DIRAS P.A.G. PRI LA UZADO DE LA SUBJUNKCIOJ:

" Krom la sep oficialaj, kiel subjunkcioj funkcias ankaŭ:

a). KIU, KIO, KIA, KIES, enkondukantaj rilatajn subpropoziciojn;
b). ĈU kaj la demanda tabelserio KIU, KIO, KIA, KIEL ktp. enkondukantaj dependajn demandojn;
c). KIE enkondukanta lokajn subpropoziciojn;
d). KIEL, KIOM kaj OL enkondukantaj komparajn subpropoziciojn;
e). KIAM enkondukanta tempajn subpropoziciojn;
f). OL en la du kunmetoj ANTAŬ OL kaj POST OL indikantaj tempon.

Sed same kiel ĉe la prepozicioj, oni sentis la bezonon disponi pri pli multaj subjunkcioj por esprimi ĉiujn pensnuancojn, kaj oni ekuzis kombinitajn subjunkciojn. Oni trovas jenajn:

1). KE povas kombiniĝi kun antaŭmetitaj prepozitivoj laŭ la formulo X TIO, KE, en kiu x povas esti ĉiu prepozicio en ne-loka aŭ ne-tempa senco: ANSTATAŬ TIO, KE; KROM TIO, KE; MALGRAŬ TIO, KE; PER TIO, KE; PRI TIO, KE; ktp. Preskaŭ ĉiam oni ellasas TIO post POR (por ke); ofte post KROM (krom ke); MALGRAŬ (malgraŭ ke); malpli ofte post ANSTATAŬ (anstataŭ ke) kaj SEN (sen ke ). Oni trovas ankoraŭ la prove uzatan PRO KE, sed post la aliaj prepozicioj ni ĉiam metas TIO, do PER KE, PRI KE, DE KE, EL KE, ktp. ne estas uzataj. KE povas kombiniĝi kun antaŭmetita adverbo: TIAL KE, TIEL KE, TIOM KE, KONDIĈE KE, KONSIDERE KE, PRETEKSTE KE, SPITE KE, SUPOZE KE ..... .

2). SE povas kombiniĝi kun antaŭmetita prepozitivo: KROM TIO SE (aŭ KROM SE); EN OKAZO, SE ...; kaj kun antaŭmetita adverbo: ESCEPTE SE, KIEL SE, EĈ SE, NUR SE, .... .
RIM. Post LAŬ TIO oni uzas ĈU aŭ KIEL. La uzo de SE, kvankam montrita de kelkaj gramatikistoj (Grosjean-Maupin) ne estas rekomendinda.

3). KIU kaj KIO en rilataj kaj demandaj subpropozicioj povas kombiniĝi kun ĉiu prepozicio: KUN KIU, DE KIU, PER KIU, POR KIU, PRO KIU, ktp.

4). KIAM povas kombiniĝi jene: DE KIAM, ĜIS KIAM, ANTAŬ KIAM, POST KIAM. Anstataŭ ANTAŬ KIAM oni uzas ANTAŬ OL, dum POST OL estas nekutima, kvankam tute pravigebla.


5. KIEL povas esti enkondukita per: DEPENDE DE TIO, KIELz; KONFORME AL TIO, KIELz ... . "*Marcel*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 53 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). La fino de la dua strofo de "La Espero" tekstas jene:
"sed dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj".
La vorto "disbatitaj" estas pasiva adjektivo; la pasiva verbo estus "(la baroj) disbatatis (= estis disbatataj). Parto de tiu frazo tekstas "per la sankta amo". Se la tuta propozicio estus en aktiva voĉo, kiu frazparto estus "per la sankta amo", kaj kiu frazparto estus la preskaŭ samsignifa "de la sankta amo"? (angle "*by*").

2). Metu en la pasivan voĉon la frazon "La infanoj akompanos la patron de la domo al la butikaro."

3). En ĉi tiu eldono de "A.E." mi kopias paĝon el P.A.G. kiu klarigas la uzon de la subjunkcio. Legu ĝin kaj respondu al la demando

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

"Kiom klaraj estas la reguloj pri la uzo de la subjunkcioj?"

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 549.

*Marcel Leereveld.*

# KIOM VALORAS PROTESTOJ KONTRAŬ VAKCINO?




Homoj kiuj kredas, ke siaj homaj rajtoj estas breĉitaj pro registaraj demandoj ke ili vakciniĝu kontraŭ kronviruso, ne havas mian simpation. Furiozas pandemio kiu jam mortigis milionojn da homoj kaj superverŝis malsanulejosistemojn ĉirkaŭ la mondo, kaj la fino de tiu hororo ne videblas.

Kiel feliĉaj estas ni, en riĉaj landoj, ke disponeblas al ni vakcinoj kiuj certigas, ke ni kaj niaj infanoj ne devas timi malicegajn infektojn, ekzemple tuberkulozon, poliomjeliton, aideson, morbilon, rubeolon, parotiditon, kokluŝon, difterion, tetanon kaj multajn aliajn. Se oni volas vojaĝi al iuj landoj, oni nepre devas antaŭe vakciniĝi.

Krome, estas tiom da senesceptaj devoj kiujn oni ĉiutage devas, aŭ devas ne, praktiki: halti ĉe ruĝa trafikolumo; ĉeesti lernejon de kaj ĝis - la aĝoj dependas de la koncerna Ŝtato; geedziĝi ne antaŭ la aĝo 18; ne stiri aŭton ĝis aĝo 17; surmeti sidlokorimenon dum en aŭto; kaj kaskon dum sur biciklo/motorciklo; ne bruligi fajron ekstere en somero; ne akvumi ĝardenon retige dum la pluva sezono; ne regali sin per drogoj; ne aĉeti aŭ trinki alkoholon antaŭ aĝo 18; ne eniri restoracion nedece vestita; ne iri nuda en publiko; ne murdi iun ajn - ne gravas kiom forta la deziro.:)


Serioze, ĉu vere ni devas simpatii kun la ne-uloj, krom se estas persona medicina kialo? Mi forte opinias, ke ne. *Vera Payne*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

1). "per la sankta amo" estus adjekto ĉe la verbo "disbati"; "de la sankta amo" estus la gramatika subjekto de la verbo "disbati".

2). "La patro akompanatos (= estos akompanataj) de la patro de la domo al la butikaro".

3). Tre malklaraj. *Marcel Leereveld.*



**3ZZZ** En la elsendo de la 20a de septembro Heather Heldzingen invitas la aŭskultantojn -kontribui al la helpo provizita al la esperantistoj de Goma ( Kongo) per la asocio Nova Familio fondita de Betti Maul.

- demandi sin ĉu dudekjara estas la plej bela aĝo
- proponas ferion en propra domo

*Franciska Toubale*

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*